

19:e ÅRG.
Nr 7

SVENSKA

JULI
1931

ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

HANSA

STOCKHOLM

Aktiekapital och reservfond

Kr. 6.000.000

Telefonanrop: HANSA



FÖRSÄKRING

Ombud: Kamrer Ad. LARSON.

SVENSKA
ESPERANTO-TIDNINGEN
LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Redaktör: Bernhard Eriksson, Tel. 127 53.
Postadr.: Biblioteksgatan 30, Stockholm.
Prenumerationspris: Helt år 2 kronor.
Lösnummer 0:20.

Annonpris: 15 öre pr mm.
Utkommer en gång i månaden.

Sveda Esperanto-Gazeto.

Redaktanto: Bernhard Eriksson.
Adress: Biblioteksgatan 30, Stockholm.
Anonco pri korespondado kostas
2 respondkuponojn.
Abono: eksterlanda: 1 jaro 2:50 sv. kr.

Svenska Esperanto-Förbundet

(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm I

Postgirokonto N:r 2012.

Arsavgift för direkt anslutna medlemmar
kr. 5:— inberäknat prenumerationsavgiften
för Svenska Esperanto-Tidningen.

Ordförande: Paul Nyfén, Huddinge.
Telefon: Huddinge 279.

Förlagsföreningen Esperanto

u. p. 2.

Postadress: Box 698, Stockholm I.
Postgirokonto n:r 578. — Tel. Vasa 70 06
Kontor och försäljningslokal: Sveav. 98.
De svenska esperantisternas eget företag.
Tillhandahåller all slags litteratur på och
om esperanto.
Prislista och upplysningar på begäran.

Svenska Esperanto-Institutet

Postadr: Box 698, Sthlm. Postgiro 51511.
Avd. för examens- och språkfrågor: Rek-
tor Sam Jansson. — Avd. för ekonomi,
statistik, kurser: E. Malmgren.

Cef-Delegito de U. E. A.

(Universala Esperanto-Asocio, Genève).
Kamrer Ad. Larson, Drömstigen 43,
Postgiro 2952 Appelviken. Tel. 942.

Förlagsföreningen Esperantos ombud.

Arlöv: Harry Hansson, Skolgatan 46.
Blädinge: Fr. Johansson, Hjälmaryd.
Borensberg: Olle Pettersson, Stensnäs.
Borås: Viktor Ekström, Söderkulla 33.
Eskilstuna: H. Sandbergs Bokhandel.
Fagersta: Gösta Johansson, Box 347.
Falun: Einar Anselius, Åsgatan 86.
Fyrunga: Erik Brenander.
Grums: Georg Nordling.
Gyttorp: Thure Johnzön.
Gävle: Alb. Liljemark.
Göteborg: Erik Ekström, Mellangatan 14.
— N. J. Gumperts Bokhandel.
Hudiksvall: Herbert Svensson, Håstavillan 10
— Hultqvists Pappershandel.
Hynboholm: Per Söderholm.
Hälleforsnäs: Elof Larsson.
Hälsingborg: Gummessons Bokhandel,
Södergatan 17.
— Hedéns Bokhandel.
— Killbergs Bokhandel.
Höganäs: Fritz Johansson, Stenbocksg. 2.
Kavås: Erland Björkman, Kungslena.
Kil: H. Nordling, Järnvägsstationen.
Klippån: Nils Björk, (till 1 juli Helge Forsell,
Vedby).
Landskrona: Erik Olsson, Hantverkareg. 19
Lidköping: Verner Sandberg, Rådagar. 12.
Linköping: C. Wikhammar, Pressbyrån.
Luåvika: Herb. R. Eriksson, Box 476.
Lund: Olle Olsson, Nils Bjelkegat. 6.
Lyse: Eric Åsberg, Kolleröd.
Malmö: S. A. Svenson, Falkenbergsg. 4A, II
— Gösta Henriksson, No. 9 Dahl A.
— Karl Österholm, Agnesgatan 7.
Maspelåsa: Carl Asp, Box 6.
Motala: Carl Hallros, Bispotala Handelstr.
Munkedal: J. A. Hansson.
Nynäshamn: Karl Karlsson, Vaktbergsv. 20
Råsunda: V. Appelkvist, Stråkv. 64, II.
Skoghall: John Englund, Bok- o. Pappersh.
Stenstorp: Hugo Sköld.
Stockholm: Förlagsföreningen Esperanto,
Sveavägen 98, 5 tr. Expeditionstid: 9
— I, 4—5. Tel. Vasa 7006.
— Biblioteksbokhandeln, Biblioteksg. 12.
Sundsvall: Thorsten Form, Sidsjövägen 22.
Svedala: Henning Bengtsson.
Södertälje: Eric Grahn, Marielund.
Torskors: Frithiof Ahnfelt, Ingiatorp.
Uddevalla: Einar Dahl, Södergatan 26.
Umeå: Sigfrid Pettersson, Öbacka.
Uppsåla: Fritz Lindén, Auroragat. 12.
— Karl Tunön, Stjernhjelmsgat. 12.
Varberg: Gunnar Johansson, Skansgatan 9.
Visby: Vessman & Petterssons Bokh. Adelsg. 5
Västerås: O. Dahrné, Lindsborg 7.
Örebro: Sigurd Ekendahl, Storgatan 8.
Örtofta: Martin Dahlin.

ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

“Kaj la du fariĝis unu.”

Venis antaŭ kelkaj jaroj al nia ofte malvarma lando filo de pli varma kaj suna lando. Venis li el Rumanujo, lando kiun antaŭ tiu tempo ni malmulte konis. Modesta homo, forta animo. Apostolo de sankta afero, apostolo Esperanta. La nomo de tiu homo: Andreo Ĉe, estimata, ŝatata, amata. Tute venkis li la svedojn; du jarojn por ni ne-takseble valorajn li dediĉis al ni. Kaj poste, kiam dank' al li firman bazon ni atingis, li forlasis nin.

Sed, Andreo Ĉe ne estus Andreo Ĉe, se li estus lasinta la per laborego akiritan teron al mema kreskado. Mem li foriris, sed sendis al ni posteulon. Kaj denove venis al nia malvarma lando filo de varma lando, venis nova apostolo Esperanta, venis Tiberio Morariu.

Du por ni neforgeseblajn jarojn Andreo Ĉe pasigis inter ni, tri jarojn jam lia lernanto kaj posteulo Tiberio Morariu plenigis per ĉion venkanta laboro, entuziasmo kaj fervoro. Du viroj en Esperantujo!

Same kiel Ĉe venkis, ankaŭ venkis Morariu. Ĉiujn li kaptis per sia ĉarma elokventeco, sia sudlandana vigleco kaj per sia profunda scio pri ĉio rilate al nia komuna afero. Sudo kaj nordo de Svedujo atestas tion unubuŝe. Sed — por uzi la vortojn de Morariu mem —

la lando de Strindberg, Lagerlöf kaj aliaj altanimuloj ankaŭ kaptis lin, kaptis lin tiel tute, ke li devas konfesi sin siavice venkita. Tamen, kio venkis lin ne estas la lando mem, ne ĝia ĉarmo, ĝia alta kulturo — estas la ĉarmo de unu filino de nia lando. La vera venkanto estas tio, kio estas la plej forta armilo en la Esperanta arsenalo, la ĉionportanta — la amo.

*

La ĉiela suno montris sian plej favoran kaj brilan vizaĝon tiun tagon, kiam por la vivo unuiĝis la filo de sudo, Tiberio Morariu, kaj la filino de la nordo, Lizzie Anderson. Kaj kiel bona kaj ĝoja la suno sin montris, tiel bona kaj ĝoja ankaŭ fariĝis la solena edziĝa festo. Ne estis grandioza festo laŭ la eksterajoj, sed estis festo, kiu post-lasas memorojn.

La unua akto, la civila geedziĝo, okazis ĉe la rumana legacio en Stockholm. Kiel Oficiroj de la Civila Stato funkciis D-ro C. Flondor, la ministro de Rumanujo, kaj D-ro R. Uhrynovski, la rumana ataŝeo. Atestantoj estis rektoro Sam Jansson kaj s-ro Ad. Larson. Post mallonga sed impresa akto, laŭtleĝo de la koncerna paragrafo el la rumana leĝo pri geedziĝo, ktp., gaje ekpafis la pacaj kanonoj, la eksplode el-

flugantaj korkoj de l' ĉampanboteloj, kaj ministro Flondor, gratulinte la novedzojn kaj la gepatrojn de la edzino, ges-rojn Carl G. kaj Sivi Andersson, to-astis ankaŭ por Esperanto.

La edziĝa festo en la katolika preĝejo en Stockholm, S:t Eugeniakyrkan, dimanĉe la 28an de junio estis simpla sed solena. Ĉeestis reprezentantoj de la sveda esperantomovado kaj de la rumana legacio kaj, krom la gepatroj de la novedzino, kelkaj el la plej intimaj amikoj de la edziĝantoj. Pastro G. Wäschle el Örebro oficis. Post la solena ceremonio kaj post kiam la novgeedzoj akceptis la gratulojn de la gastoj, oni veturis al Skansen (urba bestoparko), kie en Nyloftet oni daŭrigis la feston.

La unua, kiun ĉi tie oni vidis, estis grandega rozbukedo sendita de pastro Andreo Ĉe kun surskribo: "La plej riĉan benon de Dio al miaj gefratoj, pri kies nobla laborado memoros la mond-historio." Sur la tablo estis florarko kunplektita el svedaj kaj rumanaĵoj koloroj, meze esp. stelo.

Ĉi-tie salutis la gastojn kaj parolis por la festobjektoj rektoro Sam Jansson, elkore, humore kaj trafe. Li per sagacaj vortturnoj donis la svedan parton de la esperanta historio de s-ro Morariu kaj de lia edzino.

La reprezentanto de la rumana legacio, D-ro Uhrynovski, en la nomo de sia lando gratulis kaj en tre belaj vortoj komplimentis la paron kaj Esperanton. (Ni represas la paroladon ĉi apude.)

Red. Paul Nylén akcentis la grandan utilon, kiun havis la sveda esperantomovado de la granda laboro de geedzoj Morariu kaj dankis en la nomo de Sveda Esperanto-Federacio. Li transdonis kiel edziĝfestan donacon ŝtofan ujon esperantkoloran, kiu enhavis monsumon el oro.

Granda amaso da telegramoj, leteroj kaj kartoj montris la grandan simpa-

tion, kiun akiris gesinjoroj Morariu. Tutan horon preskaŭ bezonis la laŭtleganto, kamrer Ad. Larson, por la laŭtlegado.

Por la tempo pasinta kaj por la amikeco kaj sveda gastemeco al la fremdulo dankis s-ro Morariu, kaj tiel finis la agraba kaj kora kunestado, kaj restis nur deziri al la novgeedzoj feliĉon dum baldaŭ okazonta forvojaĝo. Kaj en pluv-ego de rizo kaj portata de forta hurakrio la du ekkomencis la ĉiam aventuran kunvojaĝon de la vivo. La historio de post tiu ĉi tago estos skribita ne de s-ro Morariu aŭ de s-ino Morariu sed de geedzoj Morariu.

Feliĉegon!

*

Telegramoj.

Alvenis ĉ. 100 telegramoj kaj 50 leteroj el 14 landoj, de la redakcio de Heroldo, ICK, C.O. de UEA, Sveda Trafikfederacio, ĝenerala konsulo princo C. Karadja de la Prezidejo de la Rumana Ministra Konsilantaro en Bukureŝto, Emil Isac, la aŭtoro de "Sonorilo kaj Kaono", k. a. Grafo K. G. Majláth, episkopo de Transilvanio (la superestro de pastro Ĉe) alsendis jenan saluton en Esperanto: "Ame sendas episkopan benon je geedziĝo, kun multaj gratuloj kaj deziron pri daŭra feliĉo."

Jen kelkaj belaj kaj amuzaj telegramoj:

"Må ert äktenskap bliva en lycklig tolk för vad världsspråket vill: binda folk vid folk. Jenny Jansson, Skövde."

"Nordo-sudo aliancas, nervoj vibras, koroj dancas. Tuta mondo telegramu, la gesolaj amu. Ahlstrand, Älvkarleö."

"Feliĉon kaj sanon, kaj unu infanon. Holmquist, Gävle."

"Unue knabeto, poste knabino. Vivu Tiberio kaj lia edzino. Nordling, Kil."

"Multan feliĉon, malmultan inciteton, iafaje knabeton. Kilanoj."



La novgeedzoj Morariu kaj gastoj antaŭ "Nyloftet".

Parolado

de rumana ataŝeo **D-ro Rudolf Uhrynovski** ĉe la geedziĝa festo de gesinjoroj Morariu.

Estas speciala plezuro al mi, ke mi povas partopreni ĉe la geedziĝo de mia malnova amiko, esperantista apostolo, Tiberio Morariu, kun apostolino Lizzie Andersson, kies religian emon al tiu ĉi subtila ideo ekumenia de universala lin-

Lunde la 29.7. Sv. Dagbl., Soc.-Dem., St. Tidn., St. Dagbl., Nya Dagl. Alleh. aperigis artikoletojn kune kun ilustraĵo kaj Dag. Nyh. en teksto menciis pri la internacia geedziĝo. Ankaŭ tio propagando por Esperanto same bona kiel kiu ajn alia.

gvo mi bone konas, komprenas kaj admiras.

Vi revivigas la kristanojn en la primitiva preĝejo, kiuj elektis la krucon, kiel la eternan simbolon de la puraj animoj, la sonĝon de la interpacigo de l' tuta homaro, per la kredo, amo kaj espero.

La vorto **E s p e r a n t o** havas la plej modestan, sed samtempe plej fieran etimologion, la **e s p e r o n**. Dum la tempo, kiam la homaro esperos, do kredos kaj amos, la armeo de la martiroj, apostoloj kaj instruistoj tenos siajn brustojn kontraŭ la darvina brutaleco enkarniginta en la animala instinkto de l' malamo, nekomprene kaj milito.

Por mi la lingvo Esperanto havas specialan ĉarmon pro tio, ke ĝi posedas — krom sia genia tekniko — an-

kaŭ harmonion artan, muzikan, kiel la maljuna Cicero en sia fama "somnium Scipionis" diras: "musica mulcet mores". Kaj Esperanto estas muziko.

Kaj se ni alvenis al la antikva filozofio, ni povas diri, ke Cicero parolas pri la muziko de la sferoj, de l' Universo, iu maniero laŭ orkestra koncepto. Hodiaŭ, kiam la stratosfero estas explore tuŝita de la homoj en sia centjara virgeco, kiam la scienco atingis la plej altan punkton ankaŭ ekster la atmosfero de la tero, estas bone menciigi ke, laŭ la grandaj filozofoj antikvaj, de longe ekzistis la alta ideo de la eterneco kaj universaleco de l' sonaro. Se ni malsupreniĝos sur la teron, kiel faris Piccard, ni ne surteriĝos sur malaltan dezerton, sed ni surflugos kiel birdoj sur altan pinton, de kie ni povos vidi la tutan homaron, kaj tiu ĉi pinto estas ĝuste Esperanto!

Sed ne ĉiuj posedas la rimedojn de unu Piccard. Por ke ni altiĝu al tiu apogea punkto, kie vi estas, esperantistoj, ni devas lukti, ascendi. Estas ĝojige, ke ni havas gvidantojn, kiuj dediĉis sin al tiu idealo. Kaj mi ne povas malfieri pri tio, ke unu el tiuj ĉi gvidantoj estas rumano.

La fakto, ke tiu ĉi rumano geedziĝis per Esperanto kun svedino, pruvas, ke Esperanto estas ne nur la vojo de la kompreno, sed ankaŭ la vojo de la koroj. La eternan poemon de l' amo, kiun kantas la birdetoj en la profundoj de l' buskoj, la maro kaj vento, mi facile imagas laŭ la ritmo de la dolĉaj kaj harmoniaj silaboj de Esperanto. Laŭ tiuj ĉi melodiaj notoj la silento devas esti eĉ pli dolĉa kaj la vortoj de tiu ĉi lingvo kreita el ĉiuj rasoj, konstituas grandiozan akompanion al la muta lingvo de la amantaj animoj. En tiu ĉi lingvo, kiu estas nova, sed en kiu ĉiu homo povas rekoni eĥon de la simplaj, familiaj vortoj de sia infanaĝo.

Tial, maljuna, kia mi estas, mi volas fari mian debuton kiel esperanta lernanto, dezirante al tiu ĉi amika paro, ke ili konservu en siaj animoj tiun ĉi unuecon, ritmon decan, kiu estis la miraklo de ilia interkonigo kaj kiu devas esti la garantio de la venonta geedziĝa vivo harmonia.

Rumano, transilvaniano, do duoble kara al mi, trovis trans sep maroj kaj landoj (por esperantisto la tero estas

malgranda) kamaradinon en tiu ĉi delikata lando. Lizzie-Gunhild Anderson, Tiberio Morariu, jen du nomoj, en kiuj resonas la pranomoj el la vera popolo, kiel ni aŭdas la pulsadon de la mara profundo en la konkro, kiam ni tenas ĝin apud la orelo.

Mi salutas vin en la lingvo Esperanto, kaj vi devas kompreni, kion signifas mia gesto. Ĝi signifas, ke mi partoprenas en via espero kaj konsideras en vi ambaŭ ne nur la unuigon de du rasoj, ne nur la unuigon de du individuecoj, sed la unuigon de la tuta homaro, en la Stela signo de la Amo kaj paco inter ĉiuj homoj, la sola saviĝo el la venonta danĝero.



Glädjande många svenskar

komma att delta i Krakow-kongressen. Redan ha närmare ett 50-tal anmälningar influerat om deltagande i E. T.K:s gruppresor. I resan över Estland äro anmälda ett 30-tal, och i resan över Tyskland ett 15-tal, däribland 5 danskar. De som ännu ej anmält sig till kongressen böra göra det omedelbart. Det minsta dröjsmål nu resulterar i nödvändigheten att få erlægga 28 kr. i kongressavgift i stället för 19 kr. Alla detaljer om kongressen och om de förmånliga billighetsresorna dit meddelas av

Esperanta Turista Komisiono
Heleneborgsgat. 6, Stockholm.

Svenska Arbetar-Esperantoförbundet,

som i år kan fira sin tioåriga tillvaro, håller sin femte kongress i Stockholm 25—26 juli. Kongressen öppnas 25 juli kl. 3 em. i Klara Folkets hus, Klara V. Kyrkogata 17, där samtidigt esp.-utställning äger rum. Lab. Esp.-klubo's nybildade sångkör utför ett sångprogram. På lördagskvällen samlas man till ett samkväm, som blir synnerligen omväxlande, och på söndagen företages en utflykt genom Hammarbyleden, i vilken alla stockholmsesperantister inbjudas delta, avgift 75 öre. Betr. kongressavgift, adress för anmälan o.s.v. se annons i detta nummer.

Se vi vizitas Stockholm, mendo loĝejon en Centralhotellet, Vasagat. 38. Pere de Esperanta Turista Komisiono vi ricevas rabaton de 10 proc.

Pähn — Hudiksvall.

Den 6 juni hölls kursavslutning i den av ABF i Hudiksvall anordnade esperantokursen, vilken stått under ledning av fröken Elinjo Pähn. Högtidssalen på gamla läroverket var så gott som fullsatt av såväl elever som inbjudna, bland vilka märktes stadsfullmäktiges ordf., ledamöter av såväl drätselkammaren, skolstyrelsen, läroverks- och folkskollärarkåren.

Hr A. Sjögren, Sundsvall, höll ett kort anförande om världsspråket, och betonade därvid den stora betydelse det



hade ur såväl trafik- som turistsynpunkt.

Fröken Pähn gav på sitt karaktäristiska, lätta, eleganta och medryckande sätt en liten lektion i esperanto.

Hr Axel Granath höll efteråt ett tal om den fria studiecirkelverksamheten och det hela avslutades med ett kort tal av H. Nordqvist, som å Hudiksvalls Esperantoförenings vägnar framförde ett tack till alla, som medverkat till den stora esperantokursens förverkligande, särskilt då till fröken Pähn.

Avslutningshögtidligheten hölls på Sanna gästgivaregård, där ett 65-tal personer samlats. Under aftonens lopp förekom mycken unison sång både på esperanto och svenska. Hr A. Sjögren och fröken Pähn höllo anföranden. En uppskattad bordsvisa föredrogs av hr Axel Granath. Fröken Margit Ekholm överlämnade med några hjärtliga ord på esperanto en vacker tennskål med inskription och fylld med rosor. Fröken Pähn tackade och berättade några anekdoter från Estland. Aftonen förflöt under angenämaste stämning.



Tunón — Alunda.

Gis nun estis Alunda nekonata loko en Esperantujo. Tie ekzistis nur kelkaj anoj apartenantaj al ido, kaj ili ankaŭ laboris por sia lingvo. Inter alie estis aranĝitaj kursoj en ido dum du vintroj, lastfoje kiam tia kurzo estis organizita, ĝi komencis kun 25 gelnantoj kaj finiĝis kun nur 2. Tio klare montras ke sen vive naskita projekto ne antaŭeniras. Tamen! En Alunda ankaŭ estas akrevidaj kaj progresemaĵoj homoj, kiuj klare vidas la bezonon de rapida solvo de mondlingva problemo. Ili ekinteresiĝis al Esperanto kaj el tiu intereso ekreskis ankaŭ decido. El Upsala oni veniĝis instruiston, venis s-ano Karl Tunón, rajtigita ĉe-instruisto.

La kursoj, dividitaj en du grupoj, komenciĝis la 24an de novembro kaj daŭris unufoje ĉiusemajne kun duhora leciono. Unu grupo estis por lernejoj infanoj kaj la alia por plenkreskuloj. En la unua partoprenis 17 infanoj kaj en la alia 11 maturaj homoj. Kvankam kelkaj loĝis tre malproksime de la kursejo ili tamen regule vizitis la lecionojn.

La 7an de junio okazis la publika finiĝo de la kursoj. Je la difinita tempo la granda salono de la bontemplanejo estis plenplena de geinteresuloj. Ili estis alveninta por aŭskulti pri tiu lingvo, kiu havas tiom da kontraŭuloj kaj ankaŭ tiom da sindonaj laborantoj. Post kelkaj muzikaĵoj popolinstruisto Hugo Fredriksson bonvenigis la ĉeestantojn kaj per kelkaj vortoj klarigis la celon de la okazintaj kursoj. Li inter alie aludis la bonan influon je la sveda grammatiko kiun li jam spertis inter siaj gelnantoj. La kursgvidanto, s-ano Tunón, parolis pri la temo: "Kelkaj aktualaj vidpunktoj en la mondlingva demando". Tuj post la parolado okazis esperanta interparolado kun la geknaboj pri kelkaj diversaj temoj. Tiu interparolo kaj aŭdeble kaj videble amuzis la aŭskultantojn. Ankaŭ estis bonsukcese farita provo enkonduki kelkajn novajn vortojn en tiun konversacion. Unu el la aŭskultantoj skribis svedajn vortojn kaj transdonis ilin al la kursgvidanto kaj li, per helpo de Esperanto, klarigis ilin kaj post kelka momento la infanoj diris la svedan signifon de tiuj vortoj. Kelkaj knabinoj ankaŭ ludis mallongan teatraĵon, kaj post tio la ĉe-

Sveda Kroniko.

Ale-Skövde. Post A.B.F.-kurso en Nygård, gvidita de T. Lindberg, Prässebo, estis fondata Ale-Skövde Esperanto-Förening. Aliĝis deko da personoj el la lokoj Nygård kaj Prässebo. Estraro: T. Lindberg, prez.; O. Hjelm, sekr.; O. Olausson, kasisto.

La menciitaj lokoj apartenas al la regiono Göta älv-dal, kiu ne tiel facile emas "verdiĝi". Tial estas bonvenega ĉia akcelo de la Esperanto-afero tie. T-n.

Dalekarlio. La Esp. Distrikto de Dalekarlio havis sian jarkunvenon 14 junio en Borlänge. La raporto de la estraro montris, ke la movado en nia distrikto marŝas antaŭen, verdire ne tre grand-skale sed tamen sufiĉe kontentige. Al la distrikto apartenas nun la kluboj en Falun, Insjön, Ludvika, Nyberget kaj Fagersta. La klubo en Borlänge aliĝos post kelkaj semajnoj. Kursoj estas faritaj en diversaj lokoj. Multaj komencantoj laboras silente. Partoprenanto el Tuna Hästberg sciigis, ke tie estis kurso kun 20 partoprenantoj. Sperta esperantisto ne ekzistis en tiu loko, sed ili studis la korespondajn kursojn, kaj la rezulto estis bona. Imitinda ekzemplo!

fo de la kursoj, s-ano Fredriksson, kun kelkaj korvarmaj vortoj dankis la gvidinton por la farita laboro kaj transdonis al li memorajon.

Post la publika parto de la finiĝo venis la privata kaj eble la plej grava parto, nome la organiza laboro. La rezultato fariĝis, ke estis fondata esperanta klubo: "Alunda Esperanto-Förening" (Esperanta Societo de Alunda). Tuj aliĝis la 11 plenkreskuloj kaj kiel estraron oni elektis jenajn personojn: Prez. Gösta Erikson; sekr. Rune Selén; kas. Bertil Palmqvist; bibliotekisto Nils Foghelin; reprez. de Eldona Societo Harry Pettersson.

La novfondita klubo jam havas propon bibliotekon kun ĉ. 30 libroj. Kiel konkludo ni rajtas diri, ke tiu klubo baldaŭ fariĝos granda kaj forta, ĉar ĝi havas bonajn membrojn. Tiu klubo signifas nova venko al Esperanto.

V e r d u l o .

Sed estas konsilinde, ke la izolaj esperantistoj kiel eble plej baldaŭ interrilatu kun la distrikta organizo. Unueco donas forton.

Kiel estraro por la venonta jaro estis elektataj: Fritz Johanson kaj Herbert Eriksson el Ludvika, Sven Céder, Fagersta, S. Engholm, Nyberget, V. Bonde, Falun, Martin Jansson, Borlänge, Ivar Karlsson, Insjön. La plenuma komitato havos sian lokon en Ludvika.

La kunvenon ĉeestis nia eminenta esperantigisto s-ro Tiberio Morariu, kiu post la oficiala kunveno faris treege interesan kaj impresan paroladon pri esperantoinstruado. Mankas loko por citi la paroladon, sed certe estus tre utile al la tuta esperantistaro, se s-ro Morariu havus eblon resume ripeti ĝin en formo de artikolo por "Espero". Ni kore dankas al li!

S. E.

Priesperanta prelego ĉe Ingesund. La 23an ĝis 28an de junio okazis ĉe la popola altlernejo Ingesund, proksime al Arvika, libertempa kurso por laboristoj el ligno- kaj paperindustrio. Sur la programo de tiu kurso ankaŭ troviĝis Esperanto. S-ro Herbert Stjernlöf el Skoghall faris tre bonan kaj interesan prelegon pri Esperanto, ĝia historio kaj disvastiĝo. La prelego estis tre bone akceptata.

Estas menciinde, ke la Vermlanda distrikto de la faka sindikato por paperindustriaj laboristoj decidis subteni la studadon de Esperanto inter siaj membroj, kaj ankaŭ donis monan subvencion por tiu celo. La iniciato estas bonega, kaj ni esperas, ke aliaj sindikatoj baldaŭ sekvos la ekzemplon .Lorenzo.

En Kvarnsveden ABF aranĝis en la pasinta vintro kurson de Esperanto. Ĝi havis malmulte da partoprenantoj, sed la intereso estis grandega kaj ni esperas ke kiam en la aŭtuno la studado daŭriĝos, la nombro de partoprenantoj multobligos. Instruisto estis popolinstruisto Alrik Vadfors.

Esperanta movado en Kävlinge. 5.5 la studrondoj finis sian du-jaran kurson kaj festis kun la esperantista klubo ĝian du-jaran ekziston. La novaj esperantistoj faris multajn esperantajn paroladojn kaj al la gvidintoj, s-roj Ivar Malmberg kaj Knut Larsson, ili transdonis kiel memorajon po esperanta flageto. Per muziko, deklamado kaj kanto finiĝis la agrabla vespero.

12.5 la klubo jarkunvenis. La klubo decidis aliĝi al "Sveda Esperanto-Federacio". Kiel estraro estis elektata: prez. Ivar Malmberg; sekr. Knut Larsson; kassisto Malte Smith.

28.5 la klubo havis sian unuan viziton de eksterlanda esperantisto, la ĉeka samideano W. Burgemeister, kiu nun veturas tra Svedujo. Li paroladis pri "Bicikla veturo tra tuta Europo kaj Nord-Afriko per Esperanto". Al la prelegado estis invititaj ankaŭ ne-esperantistoj, kaj s-ano Knut Larsson interpretis la paroladon. La ĉeestantoj aŭskultis la bonan paroladon kun granda intereso.

Nynäshamn. Under den gångna vintern ha 2 studiecirkklar arbetat, 1 för nybörjare, 1 för fortsättning samt en barncirkel. Kursledare har varit Gerhard Räupach (tysk). Sista söndagen i februari avslutades vinterkurserna med en esperantoutställning i kommunbiblioteket, som pågick under 2 dagar. Man hade en vacker samling av böcker, tidningar, brev och kort på esperanto.

I ABF:s bibliotek finnes en rätt väl sorterad samling esperantolitteratur.

Helsingborgs Esperantoklubb höll den 9 juni ett talrikt besökt sammanträde. Därvid beslöts att antaga ett förslag att endast esperanto skall användas vid samtliga förhandlingar å klubbens sammanträden.

Efter sammanträdet höll den tjeckoslovakiske esperantisten Burgemeister ett mycket intressant föredrag, i vilket han på ett medryckande sätt skildrade sina upplevelser på sin resa genom Syd-europa och vissa delar av Afrika.

En framställning hos Radiotjänst

om ett radioföredrag på esperanto av L. Sinha i augusti möttes med en hänvisning till det snart inträffande chefsombytet hos Radiotjänst och att den nye chefen närmast blir den som torde få frågans avgörande om hand. Då hr Rabes efterträdare blir rektor Y. Hugo, vilken i motsats till hr Rabe alltid ställt sig välvillig till esperanto, får man väl i förväg anse framställningen bifallen.

Jubileumsmatrikeln

har nu utsänts till samtliga SEF:s medlemmar, vilka inbetalt årsavgiften för år 1931.

Novspeca propagandilo.

Antaŭ kelkaj jaroj ni okaze ekhavis malgrandegan mondatlason enhavantan 14 landkartfoliojn. La malmultekosta atlaseto estis tre ŝatata.

Nun ĝi ree estas havebla. La landkartoj multkoloro presitaj estas redaktite sv de. Tial la atlaseto povas esti vendota ne nur al esperantistoj sed ankaŭ al neesperantistoj. Al la landkartaro mem ni aldonis 16 paĝojn kun propaganda teksto pri Esperanto kaj sur la kovrilpaĝo prezareton de lernolibroj ktp.

La prezo de la libreto estas nur 35 oeroj. Vendu ĝin grandamase en la tuta lando! Nenion diru pri la propaganda teksto! La aĉetontoj de la atlaseto certe vidos ĝin kaj kredeble legos ĝin.

Vi vidas, ke tiamaniere ni ne bezonas senkoste disdonu broŝuron, ni ankaŭ ne bezonos trudi homojn aĉeti propagandan broŝuron, kion ili kutime faras nur nevoleme, sed ili fervore aĉetos la atlaseton kaj kun ĝi ankaŭ propagandan broŝureton pri Esperanto. Kiu vendos multajn ekz. ricevos specialan rabaton. Uzu la someran tempon! Per vendado de la atlaso vi povas bone prepari por posta varbo.

Förlagsföreningen Esperanto
Stockholm 1.

Fortsättningskursens 100 kronor till Kiruna.

Vid utlottning av premien i Svenska Esperanto-Förbundets fortsättningskurs i esperanto, 100 kr. för utrikesresa sommaren 1931, blev den lycklige hr G. M. Bengtsson, Kiruna.

Vi gratulera och önska lycklig resa.

Lakshmiswar Sinha

har återkommit till Sverige för att tillbringa sin semester i kretsen av svenska vänner. Han har under det gångna arbetsåret skurit prunkande lagrar först i Estland och sedan i Lettland och Polen. Alla dessa länder berättar den enastående uppmärksamhet han överallt tilldragit sig och hur hans föredrag framkallat en esperantovåg även inom sådana kretsar, som förut stått indifferent gent emot esperanto. Om s-ro Sinhas planer för framtiden kunna vi kanske berätta i nästa nummer.

Svenska Esperanto-Institutet

önskar före den 25 juli erhålla meddelande från de föreningar och platser, som vilja anordna kurser med utländska lärare. Även sådana platser, som för längre eller kortare tid sedan beställt kurser, torde upprepa denna begäran (gärna å brevkort), så att en klar bild av slagfältet erhålles. Meddela även om Ĉe-Institutets fordran å 10 proc. av kursplatsens inkomstbrutto å kurserna kan godtas.

Svenska Esperanto-Institutet, Kursavd.
Heleneborgsgat. 6, Stockholm.

Instruistoj!

Internacia Instruista Kongreso en Stockholm invitas TAGE-anojn.

La Federacio Internacia de Asocioj Instruistaj (FIAI) okazigos sian 4-an kongreson 13—17 aŭg. en Stockholm (regna parlamentejo) kun la tagordo: 1. Deviga postlerneja instruo (por 14—17-jaraĝuloj); 2. Deviga militpreparo en la lernejo. La sekretarioj afable invitis nin, sendi representantojn en la kunsidojn.

Plej eble multaj svedaj samideanoj partoprenu kiel TAGE-noj! Krom tio TAGE delegos apartan reprezentanton por tiu kongreso.

Billighetsresorna till Estland

ĉero sa gott som aldeles fulltecknade för alla resor med undantag av den 22 juli och 5 aug. Semesterfirande esperantister böra begagna sig av denna lägenhet att få praktiskt utnyttja esperanto genom samvaro med de mest älskvärda ciceroner och värdar i Estlands intressanta städer. Förfrågningar besvaras av Esperanta Turista Komisiono, Heleneborgsgat. 6, Stockholm.

Ernfrid Malmgren, Stockholm,

faris t. n. "lernejvojaĝon" al Estonio kun 22 knaboj, kiuj en la pasinta jaro studis Esperanton kiel devigan fakon en la 8a lernejjaro. Pri la interesa vojaĝo detale raportos artikolo en la venonta numero de nia gaezto.

La unua esperantokurso por instruistoj

komenciĝis 1 julio kaj la dua okazis 13 julio. Entute partoprenas ĉ. 50 geinstruistoj kaj krome kelkaj neprofesiaj instruistoj. Ankaŭ tiun ĉi jaron gvidas la kursojn s-ro Gösta Ahlstrand.

Propagandafonden.

Anna Lindberg, Wallåkra	10.—
H. Nordling, Kil	10.—
Jacob Jacobson, Nordmaling, utdeln.	1.60

Svenska Arbetar- Esperanto-Förbundet

håller sin femte kongress 25—26 juli i Stockholm. Kongresslokaler: Klara Folkets hus, Kl. V. Kyrkogata 17. I samband med kongressen utställning av esperantokorrespondens och litteratur. Kongressavgift 2:— kr. Anmälningar om deltagande till: K:o Hj. Olsson, S:t Eriksgat. 85, uppg. II, Stockholm, postgiro 53160. — Till talrikt besök inbjuder

Kongresskommittén.

NYHETER!

TRIDEK JAROJN EN LA ORA NORDO.

Historien om tjecken, som genom Sibirien vandrade till de arktiska regionerna och där kvarstannade.

Pris häft. kr. 3.60, bind. 4.50.

MR. TOT

AĈETAS MIL OKULOJN.

En ny originalroman av den moderne författaren Jean Forge. Spännande handling och värdat språk.

Häft. 3.—, inb. 4.30.

ISLANDO.

Dess geografi, historia och litteratur. Med 1 karta — Pris 2.00.

Lösnummer av Literatura Mondo.

Pr ex. 70 öre.

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.
Postfack 698, Stockholm I.

In- och Utländsk Litteratur

Esperantoavdelning

Nya Aktiebladet Biblioteksbokhandeln
Biblioteksgatan 12, Stockholm

1931 års Prislista från Förlägsföreningen Esperanto u. p. a.

Box 698, Stockholm 1. — Postgirokonto Nr 578

Order överstigande 10 kr. försändas portofritt. Vid insändande av förskottslikvid för mindre order bifogas 10 proc. till portokostnader. Fullständig prislista på begäran gratis och franko.

Läroböcker, Ordböcker m.m.

Esperanto utan förkunskaper

av Harald Skog, bearb. av Sam. Jansson. Enkel, grundlig o. innehållsrik. 0:50.

Lärobok i Esperanto

av P. Nylén. 8 uppl. Mycket spridd och omtyckt, särskilt lämplig för dem, som äga språkundervisning. 1:—.

Praktisk lärobok i Esperanto

för kurser och självstudium. Övers. fr. engelska av S. O. Jansson. Omväxlande, intressant och rik på förklarande exempel. 2:a upplagan. 2:—.

Kurs i Esperanto

för självstudium och studiecirkel av Fritz Lindén. Synnerligen enkel. 0:90.
D:o, del II. Läsebok. 0:90.

Lärobok i Esperanto

för A.B.F. och andra studiecirkel av Jan Massiak. Inb. 2:50.
Kommentarer till d:o. 1:—.

Esperanto-Kurso

av V. Setälä. En enkel och trevlig läro- och läsebok med översättning av texten till svenska. Illustrerad. 0:50.

Lärobok i Esperanto

av Carl Ohlsson. Grammatik uppställd efter satsdelarna. Innehåller på samma gång en svensk satslära. 3:—.

Esperanto-Grammatik

av Läroverksadjunkt Nils Nordlund. 1:50.

Nyckel till Esperanto (8:e uppl.)

En miniatyrlärobok på 36 sid. med ordlista. Utmärkt för propaganda. 0:10.

Esperanto-svensk ordbok

av G. H. Backman. Den utförligaste vi äga. 3:—. D:o inb. 4:—.

Svensk-esperantisk ordbok

av G. H. Backman. Oumbärlig för envar som skall skriva esperanto. 4:—. D:o inb. 5:—.

Dubbel fickordbok i Esperanto

av Carl Ohlsson. Svensk-esperantisk och esperantisk-svensk ordbok. 192 sid. 1:50.

Esperanto-Parlör

av N. Nordlund. 1:—.

Fundamenta Krestomatio

av D:r L. L. Zamenhof. Läsestycken, avsedda att utgöra mönster för god esperantostil. 3:25.

En bok som varje esperantist bör äga och grundligt studera.

Fundamento de Esperanto

av D:r L. L. Zamenhof. Grammatik, övningsstycken och ordförteckn. på franska, engelska, tyska, ryska och polska språken. 1:75

Lingvaj Respondoj

av D:r L. L. Zamenhof. Esperantos skapare giver här utmärkta svar på språkliga frågor. Rekommenderas. 1:50

Nameso.

Läsebok för nybörjare i Esperanto. Med jämnlöpande svensk och esperantisk text. 0:40.

La konscienco riproças (Samvetskval)

av Aug. Strindberg. 1:—

La insulo de feliĉuloj

(De lycksaligas ö) av Aug. Strindberg. 1:50

Svenska Esperanto-Förbundets Fortsättningskurs.

6 lektioner. 5:—.

Propaganda.

Tio sanningar om Esperanto.

Flygblad. Pr 100 ex. 2:—

Vad är Esperanto?

Flygblad. 100 ex. 1:—

Brevkort

med svensk propagandatext. 10 st. 0:40, 100 st. 3:—

D:o med esperantos grammatik.

10 st. 0:40, 100 st. 3:—

Esperantostjärnor

1. Femuddig grön stjärna med inskript. »Esperanto», nål, 0:75.

2. Vanlig femuddig grön stjärna, nål, 0:60

3. D:o, d:o brosch, 0:60

4. Miniatyrstjärna, nål, 0:40

5. U. E. A.-stjärnor (endast för medlemmar av U.E.A.) nål ell. knapp. 1:25



Lär Eder Esperantos uttal efter grammofon!

**Grammofonkurs i esperanto om tre skivor jämte
texthäfte med förklaringar.**

Intalad av fil. mag. Sam Owen Jansson m. fl.

Spela en skiva på grammofon, lyssna och härma efter!

Spela den om igen! Omedvetet tillägnar Ni Eder språkets melodi.

Grammofonen har efter den sista tidens förbättringar blivit ett värdefullt hjälpmedel i språkundervisningen. Det enkla och lätt lärda esperantospråket fordrar dock icke någon vidlyftig och dyrbar grammofonkurs. Tre skivor med koncentrerade uttalsanvisningar är tillräckligt för en inledning i studiet av språket.

Ni kan spela Edra esperantoskivor när helst Ni önskar. Snart vänjer Ni örat vid de främmande ljuden och kommer på ett bekvämt sätt över det besvärliga nybörjarstadiet, som är det tråkigaste i alla språkstudier.

I texthäftet finner Ni översättning av skivornas texter samt därtill nödiga förklaringar.

För att grammofonkursen i esperanto skall finna vidsträckt användning ha vi satt priset så lågt som 12 kr. för hela kursen, inberäknat texthäftet, emballage- och portofritt. Detta pris överstiger föga vad en enda skiva av jämförliga språkkurser plägar kosta.

Även enstaka skivor säljas. Pris pr st. kr. 4:50. Texthäfte kr. 0:60.

Grammofonkursen kan även erhållas på avbetalning. Villkor meddelas på begäran.

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

Box 698, Stockholm.

(Expedition: Sveavägen 98 V.)

Tel. Vasa 70 06.

Postgirokonton 578.

NOVA VERKO PRI LA VIVO KAJ MOROJ EN ARKTAJ REGIONOJ.

En julio aperos esperanta traduko de la verko:

Tridek jaroj en la ora nordo

de J. WELZL.

Mallonga enhavo de la verko estas jena:

Welzl estante junulo foriris el sia hejmo, piede li marŝis al Genova, de tie li veturis al Ameriko kaj reen preter Afriko kaj trans la Hindan Oceanon al Vladivostok kaj poste al Irkutsk, de kie li piediris trans Siberion ĝis la Arkta Maro kaj ekloĝis sur la insulo Nova Siberio inter Eskimoj, kie li ĉasis kaj negocis, akiris konsiderindan havaĵon kaj fine oni elektis lin landestro.

La prezidanto de I. C. K., sro. JOHN MERCHANT, kiu tralegis la tradukon esprimis sian opinion pri la verko jene:

„Antaŭ ol mi finlegis la antaŭparolon, mi konvinkigis, ke mi havas en ta manoj tute neordinaran literaturaĵon. Mi legis kaj legis senhalte ĝis mi englutis la tutan rakonton pri la vere mirindaj aventuroj de sro. J. Welzl. La verko en sia esperanto-vestaro estas unu el la plej intereskaptantaj, kiujn mi iam legis ne nur en la internacia lingvo, sed en ia lingvo entute . . .

La stilo de la verko estas belega, la fakto, ke mi legis la tutan verkon senhalte, ĉar mi ne povis lasi la legadon kaj enlitiĝi antaŭ ol mi alvenis al la lasta paĝo, estas vera pruvo de la flueco de la traduko; la beleco de la frazoj ofte elliras admiron . . .

Kelfoje la aventuroj de sro. Welzl elvekis mian suspekton, ĉar ili ŝajnis al mi nekredeblaj, sed mi konsultis la »Encyclopaedia Britanica« por kontroli liajn konstatojn kaj kun ĝojo mi trovis, ke en ĉiuj dubaj cirkonstancoj li havas la subtenon de tiu aŭtoritato pri la vivo, moroj kaj kutimoj de la Eskimoj. Sed sro. Welzl diras al ni pli ol ĉiuj aliaj verkoj, kiujn mi legis ĝis nun kaj la detalitaj priskriboj, kvankam okaze maldelikataj, jetas klaran lumon al la vivo en la malproksima nordo . . .

Mi estas certa, ke la verko prenos sian propran lokon kiel unu el la plej valoraj literaturaĵoj en nia ĉiam kreskanta biblioteko de trezoroj.“

La libro enhavos proksimume 320 paĝojn en formato de 16×22 cm kaj kostos nebindita kr. 3.60 plus 10% afrankite. Laŭdezire povas esti liverata ankaŭ bindita libro, kiu kostos kr. 4.50 plus 10% afrankite.

Mendu ĉi tiun legindan verkon ĉe la:

ELD. SOC. ESPERANTO

Box 698, Stockholm 1.

Poŝtoĉeka konto 578.

ATENTE LEGU!

**Kiuj mendas
la tri verkojn kune**

ĝis la 15-a de julio (el malproksimaj landoj ĝis 1. aŭgusto) ricevas la brosuritan eldonon anstataŭ sv. k. 7'80, por sv. k. 6'50 (afrankite), la binditan eldonon anstataŭ sv. k. 9'10 por sv. k. 10'— (afrankite). — Rapidu mendi de la eldonejo „**Literatura Mondo**“, Budapest, IX., Boráros-tér 6, IV. 11, de niaj reprezentantoj kaj de la seriozaj esperantistaj librokomercistoj.

Abonojn kaj mendojn sendu al
FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Stockholm 1. Fach 698
poŝtkonto n-ro 578

Literatura Mondo presejo Pestvidéki Nyomda Vácon

Medŝtjler Sv. Esp.-Tida.



**Tri verkoj de
Kolomano
Kalocsay**

aperos ĝis la fino de julio 1931

Streĉita Kordo

originala poemaro, 192 pĝ.
bindita sv. k. 4'30; broŝurita 3'—

Rimportretoj

poemoj pri la Esperantaj „steloj“.
128 pĝ. kun 55 fotoj.
bindita sv. k. 3'30; broŝurita 2'20

Lingvo, Stilo, Formo

lingvaj studoj, 160 pĝ.
bindita sv. k. 3'30; broŝurita 2'20

Aldonu 10% por sendkostoj

LITERATURA MONDO
Bleier Vilmos
Hungarujo, Budapest IX.
Boráros-tér 6, IV. 11

! ATENTU LA DORSAN FLANKON !

Kiu estas Kolomano Kalocsay?

»Hodiaŭ mi relegis en malnova numero de Literatura Mondo la poemon »Patrineco« de Kolomano Kalocsay. Ĉiu ajn lingvo povas envii pri tia literatura trezoro. La lingvo, sur kies lango ĝi estis kantata, estas vere vivanta lingvo..

Paŭl Nylén, akademiano, Svedujo.

»Mi ĉiufoje atentigas miajn samideanojn pri via »Tragedio de l' Homo«. Legadi tiun poemaron esperante estas por mi ĉiam granda ĝuo. Ho, mi tiel dezirus posedi *tian* tradukon de la »Infero« aŭ de la »Faŭsto«!

H. J. Bulthuis L. K. Hago.

Pri la poemoj de Kalocsay : kompreneble liaj poemoj vivos tiom longe, kiom la lingvo mem. Estus al mi neeble esprimi mian admiron por tia poemo, kia »Iras Abiturient'«, kies vortoj kaj ritmo volvis sin en mian plej intiman vivon...«

K. R. C. Sturmer, ĉefredaktoro de IL. London

...Mi tute aparte ŝatas liajn studojn pri la Esperanta versfarado. Mi fervore gratulas lin pri la interesega kaj tute aprobinda artikolo, aperinta en la marta numero de la feliĉe reviviĝinta Literatura Mondo.

Grossjean-Maupin, akademiano, Paris.

Se tamen restus malkviet'
En koro, jen konsola voko :
Vin rekompencos postepoko
Per pli honora epitet' ...

Pardonon petas la poet'.

El la enŝavo de la verko Lingvo, Stilo, Formo

Esperanta vortfarado

(Derivo kaj vortkunmeto ; ilia identeco en Esperanto ; vortreefiko ; ĝia grandega graveco en la komprenebligo de la Esperanta vortmekanismo ; vortanalizaj ekzemploj ; la komplikitaj vojoj irataj senkonscie dum vortkunmeto ; ilia lumigo per la rekta kaj inversa vortefiko.)

La evoluo de la poezia lingvo Esperanta

(Logiko gramatika kaj logiko senca ; la poezia kapablo de Esperanto ; la pretendoj de la poezia lingvo ; riĉeco kaj facileco ; la ekzemplo de Zamenhof ; la lingvo de Grabovski ; vojoj de estonta evoluo ; unueco de stilo ; poezio kaj publiko.)

Sendemandaj respondoj

(Duoblaj literoj ; virinaj nomoj ; difina artikolo ; ata kaj ita ; kunmetitaj tempoformoj ; kvazaŭ ; mirinda ; iom pri la vortsekvo ; iu kaj ia ktp.)

La Esperanta Rimo Esperanta elparolo Klasika metriko en Esperanto

Du poemoj el la verketo
Rimportretoj

Antaŭsoneto

En rondelformo facilanta
Portretojn pentras la aŭtor'.
Jen — por honor' kaj por memor' —
Galerieto Esperanta.

Se iu estus tro malvanta
Por kredi : troas lia glor',
Pripensu : flatas reflektor'
De la poet' fantazianta.

Se pensus viro eminenta,
Ke ne sufiĉe elokventa
Estas la skribo pri l' merit' :

Pripensu, kaj li jam pardonis :
Rondel' mallonga ne disponis
Pri lok' sufiĉa por recit'.

Postrondelo

Pardonon petas la poet',
Se ŝercon iu prenis moko'
Pripensu ja, ke ne sur roko
Estas ĉizita ĉi portret'.

Facilsubtila rondelet'
Per vent' forflugos kiel floko.
Pardonon petas la poet'
Se ŝercon iu prenis moko'.

Du poemoj el la verko
Streĉita Kordo

Enkonduko

Streĉita kordo! Gojo kaj lamento
Vibriĝis vin. Sed ili al la brust'
Delonge fremdas kaj indiferento
Jam kovras ilin per dilepolva krust'.
Kordo, vi longe kuŝis en silento,
Jani eble vi eĉ raŭkas pro la rust'...
Resonu tamen la kaŝitajn kantojn,
Vi eble povos trovi aŭskultantojn.

Malnovaj kantoj! Ho, ĉu estas ili
La miaj do? Mi ja ne scias mem.
Ĉu sentojn tiel povis mi ekzili,
Ke min ne tuŝas jam ilia trem'?
Ĉu tiel povas mi min malsimili,
Ke sen kompren' mi miras pri poem',
Kiun mi kantis iam larme, sange?
Ho, jes ja, tiel estas, eĉ se strange.

Mi iris, iris tra la vivo vage
Kaj vibris mia kordo sub la arc',
Kantante : ĉu revadas mi senage,
Aŭ ŝvite penas mi sub peza ŝarĝ',
Ĉu al ĉiel' mi pafas gojon sage,
Aŭ malespere dronas mi en marĉ'...
Sed — ĉu mi scias tion el memoro,
Aŭ nur el eho de la kordsonoro?

Aŭ, ĉu mi sonĝas nur? Jen, mi ekridas
Pri l' malprudenta, erarvaga ir'.
Ok jaroj pasis. Nun jam takte bridas
Piedojn siajn la matura vir'.
En mia kor' freneze ne avidas,
Nur moderflame brulas la dezir',
Jes ja, mi iĝis pli prudenta, saĝa,
Pli filozofa, ĉar, ho ve, pli aĝa.

Sed tamen, ĉu nur sonĝo, ĉu memoro
Estas la bildoj de l' ŝaŭmanta Jun',
Kiu vetlarmis kun la nuba ploro,
Kiu vetridis kun la ora sun' :
Streĉita kordo de l' streĉita koro,
El sub la rusto eksonoru nun !
Disflugu velka kanto, velka sento :
Folifalaj' kirlita de la vento !

La fremdiginta tinto de liuto
Kun ĉiu sia tede tikla rim'
El ĝena troproksim', per vasta ŝuto,
Forflugu al la fremda malproksim',
La kantojn, kiuj premis min per muto,
Mi fine ĵetu jam el la anim',
Kiel balaston ĵetas la balono,
Por flugi al pli alta regiono.

Versojn oni ne aĉetas

Ĉu libera vers', aŭ stanco,
Blanka vers', aŭ rimokulto,
Pura rim', aŭ asonanco :
Sama estas la rezulto.
Ĉiu ĉie ĝin ripetas :
Versojn oni ne aĉetas.

Versojn oni ne aĉetas :
Jen la Nepro, jen la Vero !
Versojn Oni Ne Aĉetas :
Ĉirpas jam eĉ la pasero,
Vane la poet' poetas :
VERSOJN ONI NE ACETAS !
Do, ne fantaziu vante
Pri l' potenc' de via arto,
Presu tekston Esperante
Por bildflanko de poŝtkarto,
Ĉiujn vendos vi, mi vetas.
Versojn oni ne aĉetas.

Pri la verda stel' ne odu,
Tio estas vanaj klukoj,
Ĝin surpentru aŭ surbrodu
En angulon de poŝtukoj.
Bonan gajnon mi profetas.
Versojn oni ne aĉetas.
Versoj estas kvazaŭ fumo.
Oni havas ja rimedon
Havi fumon per monsumo :
Esperantan cigaredon
Oni en la buŝon metas :
Versojn oni ne aĉetas.

Esperantan stamporingon,
Selkon, ciron kaj kravaton,
Tason, vazon, razoklingon,
Stelfiguran pudingpaton,
Medalionon kaj bombonon,
Mirindaĵojn plej diversajn,
Verdstelitan pantalonon,
Ĉiujn jes ! Sed librojn versajn ?
Monon oni ne elĵetas,
Versojn oni ne aĉetas.